

Novajoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

NIAJ PLANOJ

ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (=Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama.

*Daŭriga Kurso kaj 4 Regulaj Klasoj okazos daŭre en marto. Ni planas renovigon de la regulaj klasoj, ke membroj povu elekti deziratan klason ol la ĝisnunaj.

*Foiro de la urbanaj agadoj
mar. 12 (sab)

Ĉe nia regula kunveno, okazas multaj agadoj de diversaj kulturaj kaj edukaj klasoj. En tiu ĉi tago, ni havos interkonan agadon, anstataŭ niaj regulaj klasoj.

*Lego-kunveno mar.19 (sab)
14h00-16h00, 9a-etaĝa salono
Oni parolos impreson post legado de la libro "Ruĝa kokono", novelaro de Abe Kōbō, tradukita de Hayasi Kenn.

*Hama-Ronda Vespero mar. 19 (sab)
17h00-19h00, ĉambro 709
Temo: Vasilij Eroŝenko (en la japana kaj Esperanto)
Preleganto: s-ino ISAKI Miĉiko

La jaro 2010 estis la 120a datreveno de la naskiĝo de Eroŝenko, rusa literaturisto vivinta en Japanio inter 1914-1916 kaj 1919-1921. Li, naskiĝinta en 1890, perdis vidpovon en la

4a jaraĝo, kaj tamen vivis sian vivon, mem kiel instruisto en blindula lernejo. Dume li verkis novelojn en Esperanto, la japana kaj la ĉina. La preleganto studis la vivon de Eroŝenko en la japana socio.

*Hama-Ronda Vespero apr. 16 (sab)
17h00-19h00, ĉambro 709
Temo: la 16 reguloj de Esperanto (en la japana)
Preleganto: s-ro SIBAYAMA Zyun'iti
Laŭ la preleganto, Esperanta gramatiko ĉe la naskiĝo celis eŭroplingvanojn, kaj tial estas foje malfacile komprenebla al japanoj.

*Hama-Ronda Vespero maj. 21 (sab)
17h00-19h00, ĉambro 602
Temo: Ekskurso tra la misteroj de Romo (en Esperanto, kun bildoj)
Preleganto: s-ro Glauco POMPILIO
La denaske itala preleganto, longe loĝanta en Jokohamo, prezentos la nekonatajn aspektojn de Romo.

<< KOREKTENDO >>

En la februaro n-ro 257, la loko de AFIŜO-PREzentado en feb. 26 (sab) estis ĉe "Puratto Sakae". Tio fakte okazis en la Publika Halo de la Kvartalo Sakae (de Urbo Jokohamo). Pardonon pro erara skribo.



■ Eldonas Aida Yayoi ■ Redaktas la organa fako de JER: Miyazaki Hideko
■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

LETEROJ

el Ĉeĥio

Karaj redaktoroj de Via Esperanto-Rondo, Via gazeto Novaĵoj Tamtamas venis hieraŭ en la ordo kiel ĉiam, mi kopiadas ĝin por niaj klubanoj. Al s-ro Sibayama mi volus diri, ke li ne paniku pro neveno de artikoloj. Mi estas 13 jarojn redaktorino de Informilo - gazeto de Asocio de Esperantistaj Handikapuloj - kiun Vi ankaŭ ricevadas jam la duan jaron elektronike (pere de-mailo). Ofte mi havas malmulte da materialo, do mi devas serĉi en aliaj ĵurnaloj Esperantaj aŭ ĉeĥaj kaj transskribi aŭ rekte traduki. Vi povas tien meti ankaŭ iajn interesaĵojn de historio de Via lando aŭ de Viaj signifaj personecoj, pentristoj, skulptistoj ktp. kiuj en tiu monato havas ian rondan jubileon. Almenaŭ mi tion tiel devas fari, kiam mi ne havas sufiĉe da materialo.

Sed ankaŭ Vi povus reagi je nia gazeto, kiam Vi ricevas ĝin. Ankaŭ de ĝi Vi povas transpreni ion, kio estas por Vi interesa. Amike salutas Vin Jarmila Rýznarová, el la ĉeĥa urbo Pardubice

Dankon, ni iam utiligos viajn artikolojn. Cetere, enpaĝiganto estas s-INO Sibayama, sed ne s-ro.

el Ĉeĥio

Saluto el Ĉeĥio al la Rondo tra s-ino Kogakura Hiroko

Mi legis en gazeto de vi, ke vi havos jarkunvenon. Se vi partoprenos, salutu el ĉiuj de nia esperanto-klubo Přerov(CZ), ni deziras al gesamideanoj por nuna jaro pacon, amon, sanon, progresojn en esperanta movado, bonŝancon, novajn anojn por via esperanta klubo, belajn kaj sunajn tagojn sen katastrofoj, nur feliĝon por ĉiuj en via lando.

el Brazilo (gazeto GISTO)

Tre estimindaj eldonistoj de NOVAĴOJ TAMTAMAS,

PLAĈAS AL MI LEGI, KE VI MULTE KUNVENAS KAJ HAVAS E KURSOJN.

EL viaj tekstoj de decembro plej plaĉis tiu LITERATUMAS HAMA-RONDO. Nur unu fojon okazis anstataŭo de R per L. Agrabla legaĵo.

Mi preferas surpaperajn tekstojn ol surekranajn.

Mi demandas, ĉu via ambasadejo en Brazilo akceptas leterojn plu sendotajn al Japanio.

Al via tuta skipo mi deziras tre feliĉan 2011 kaj same al ĉiu gefamilianoj,

Amike kaj samideane, via tradicia leganto



Dankon pro via gazeto. Nia ambasadejo kredeble ne transsendos viajn leterojn, bedaŭrinde.

el Francujo

Dum la kultura kunveno de la 12-a de februaro, Thierry Tailhades proponos prelegeton pri hajkoj, populara japana poemformo. Post ĝi eble ni ankaŭ ludos per vortoj. (El Rhone Esperanto, Liona E-Centro)



ESEĴOJ

Rudimenta kurso kaj la gvidanto

ITABAŜI Micuko

Rudimenta kurso en nia rondo okazis dekfoje inter 2010-10-30 kaj 2011-1-18. Mi partoprenis en ĝi kiel gvidanto.

Unue kvar personoj partoprenis en ĝi, sed nur tri el ili finis la kurson kaj nun daŭrigas la lernadon.

Mi jam longe ne gvidis esperantan kurson kaj mi pensis min gvidinto. Mia opinio estas ke pli junaj homoj devas gvidi tiujn kursojn. Ĉar por gvidi aliajn ni devas relerni kaj ekzerci nin mem. Nome instruante ni ankaŭ progresos. Plie iam iuj servis nin por Esperanto kaj ni ŝuldas al antaŭuloj kaj devus redoni ĝin al Esperantujo.

En 1980aj jaroj ĉe ni mankis gvidantoj. Tiutempe membroj de nia rondo estis pli-malpli 100 personoj. Iu kamarado proponis, ke ni imitu ĉinan edukmanieron. Oni nomis ĝin sistemo de malgrandaj instruistoj. Tiam en ĉinio estis multaj analfabetoj. Por solvi tiun problemon ĝi praktikis ke lernintoj transdonas siajn lernitaĵon al novaj lernantoj, kaj ili nomis tiujn gvidantojn malgrandaj instruistoj.

Kaj ni sensperte gvidis kursojn. Okazis ke gvidanto ne povas respondi al demando de lernantoj. Kaj por respondi al tio gvidantoj devis multe studi. Retrovidante tiun tempon, mi sentas, ke nia rondo estis tre vigla. Nun la membroj malkreskas ĝis preskaŭ 60. Ĉu nia rondo tro maturiĝas kaj estas en la krepusko? Mi volas ke nova generacio kuraĝe gvidu nian movadon, kaj ankaŭ volas kredi, ke baldaŭ venos nova tagiĝo.

Forlasita Biciklo

KOYAMA Takesi

Mi amis kaj amas biciklon, sed lastatempe mi ofte bedaŭras vidante forlasitajn biciklojn en rivereto de kamparo aŭ sur angulo de senhoma vojeto.

Antaŭ longe kiam mi estis dek-jara, mia patro permesis min ludi biciklon kaj mi spertis plezuron bicikladan. En mia lerneja tempo post la 2a mondmilito mi vizitadis mezlernejon, kiu estis dek kilometrojn for de mia domo, per biciklo dum ses jaroj. Tiam mia biciklo ofte

paneis sur la vojo kaj mi piediris puŝante ĝin eĉ unu horon. Reveninte hejmen, mi tuj komencis ripari ĝin. Ĉar en mia hejmo ne estis alia biciklo kaj en nia vilaĝo oni ne havis buson nek trajnon por frekventi. Biciklo estis unusola trafikilo por lernantoj. Do la biciklo fariĝis mia amata necesajo. Tiam ĉiuj bicikloj havis la nomon de posedanto sur postrada framo de biciklo. Ankaŭ mia biciklo havis la nomon kaj la adreson skribitan sur la framo per blankaj literoj.

En la urba biciklometejo aŭ antaŭ supervendejoj vice staras multaj bicikloj, kiuj ne havas nomon de posedanto kvazaŭ senhejma orfo. Kvankam kelkaj bicikloj havas sur la postrada framo malgrandan etiketon kun grupa nomo: lernejo, biciklometejo aŭ apartamentaro. Mia banala biciklo havas etiketon kun mia familia nomo, apartamentaro kaj ĉambra numero.

Kial la posedanto devas kaŝi sian nomon? Oni diras ke multaj homoj ne volas skribi sian nomon por defendi sian privatecon.

Antaŭ kelkaj tagoj mi trovis ĉirkaŭ 20 biciklojn metitajn unu sur alian malantaŭ urba vartejo. Ili estis kolektitaj sennomaj bicikloj kun difekto: krevita pneŭo, kurbiginta frontrado, perdita selo, demetita ĉeno ktp. Laŭ mia sperto se oni riparos la difektaĵon, oni povos uzi ĝin ankoraŭfoje. Ĉiuj havis nenian legitimilon de posedanto.

Kial oni postlasas utilaĵon? Ĉu oni ne havas intimecon al la fidela servilo? Antaŭ ĉirkaŭ 40 jaroj multaj japanoj kredis la frazon de komerca propagando "unu-uzado estas virta". Ili kutimiĝis al abundo da varoj kaj forĵetis ankoraŭ sufiĉe uzeblajn objektojn facile kaj senzorge.

Nu, kial forlasitaj bicikloj abundas en urbo? Ĉar multaj homoj ne havas la respondecon kiel posedanto de la biciklo. Ĉiuj bicikloj devas havi la etiketon kun posedanto-nomo. Mi opinias kiel bicikl-amanto, ke sennoma biciklo estas same kiel aĉulo kaŝanta vizaĝon per masko kaj nigraj okulvitroj.

(2011/02/12)



BELETRO

Orienta violono de Minoru (Parto 3)

verkis Satoo Haruo

tradukis AIDA Kiyoshi

La valizo de Minoru ne estis tre granda, sed en ĝi li kunportis donacon al ni. Ĝi estis la kesto de ananasoj eble aĉetitaj en Honolulo. Troviĝis tie 12 skatoloj kaj unu el ili parte pufiĝis. Mia patro diris, "Ĝi difektiĝis." Kiam mi scivoleme malfermis ĝin, ĝi forte malbonodoris. Mi trovis neniun ananason. La patro, kirlante la internon, abrupte ekkriis. "Dio mia! Estas fingro!" Mi enrigardis kaj konfirmis ĝin. Laŭ mia patro la fingro de vundita laboranto en fabriko eble enmiksiĝis. Kiam mi rememoris pri Minoru, ĉiam venis al mia koro la sinistra fingro. Kies fingro? La familio enteregis la fingron venintan de fora lando en la angulon de nia ĝardeno.

Temas pri la ladskatolo oni rememoris la orientan violonon de Minoru. Li havis strangan muzikan instrumenton. Ĝi estis farita de la ladskatolo, kiu havis nek kovrilon nek fundon nur kun oleitaj paperoj ambaŭflanke. Kaj ĝi ankaŭ inkluzivis bambustangon kaj draton.



Mi kutime iris al la ĉambro de Minoru, sed tio ne plaĉis al ĉiuj familianoj. Sed mi volis aŭskulti la rakonton de Minoru pri Usono: urboj en Usono, knaboj en lernejoj, kiuj ekzercas parolmanieron, kaj pri 17-jara Minoru mem, kiu

vizitadas lernejon kune kun knaboj de 8 jaroj, kaj vitejoj en Kalifornio. Li rakontis pri ili, sed abrupte mutiĝis kaj elprenis manfaritan orientan violonon el la valizo. Minoru fervore komencis ludi violonon sola. Mi ne komprenis kion li ludis. Minoru ŝajne forgesis momenton, ke mi estas apud li. Subite li ĉesis ludi violonon kaj diris, "Mi memfaris la muzikilon. Mi petis de iu sendi bambuon el Japanio, ĉar ĝi ne troviĝas en Usono. "Dirinte tion li denove fervore ekludis violonon.

Minoru ĉiam ludis violonon. Kiam mi vizitis lian ĉambrom, li ludis violonon

kun rideto sur la vizaĝo, sed li ne rakontis pri aliaj aferoj. Miaj familianoj riproĉis mian oftan viziton al la ĉambro de Minoru. Poste mi ne povis iri al la ĉambro. Mi varmigis min sola sub la suno aŭskultante la muzikon de violono el la malproksima ĉambro.....

Kelkajn jarojn poste Minoru mortis. Probable li estis 26-aŭ 27-jara. Se li vivus, li fariĝus 40-jara nun. (Fino)



Raporto pri la Jarkunveno por 2011

En la 29a de januaro, okazis la Jarkunveno de Jokohama Esperanto-Rondo. Al ĝi venis 16 membroj, kaj kun 23 mandatoj el ne-ĉeestintoj, jenaj aferoj estis aprobitaj kaj diskutitaj.

*Saluto de la prezidanto, s-ino AIDA Yayoi. En ĝi ŝi menciis, ke 3 novaj kursanoj en la lasta aŭtuno aliĝis al la daŭriga lernado.

*Raporto de la lasta jaro, de la direktoro, s-ino MIYAZAKI Hideko

*Kasraporto de la eksa kasisto, s-ino MURATA Kazuyo, anstataŭlegita de la nova kasisto,

s-ino TORII Husako. La ĝenerala buĝeto por la kalendara jaro 2011 antaŭvidas enspezon/elspezon de ĉirkaŭ miliono da enoj. Krome estas monfonduso je 750 mil enoj.

*Kasraporto pri Mevo-Libro, la eldona fako, de s-ino DOI Ĉieko

*Libera diskuto sekvis. Inter alie, la lernoklasoj sabataj estos reformitaj de la venonta aprilo, post varbado de novaj membroj fare de la gvidantoj. (resumis SZ)